

### Memore al Nikolao Kurzens

Mirigi ne povis la sciigo ke nia granda poeto Nikolao Kurzens, 49-jara, elektis la morton, sed tamen ĝi skuas nin. Al mi ĉi tiu sinmortigo ŝajnas akuzo al la aĉa mondo kiu estas nia, al ni, homoj, kiuj kreas tiun aĉon. Kiel junulo Kurzens jene poemis:

#### LACA PENSO

*Mi estas laca. Nur kun peno treni  
mi povas min antaŭen, kun malbeno  
pri la obtuza muĝo de l' amaso.  
Ĝi min ĉirkaŭas, kvazaŭ flava gaso,  
envolvas ĉion, igas koron sveni.*

*Mi estas laca. Serĉas vane mano  
la anson de l' savanta pord'. Rikane  
algapas min la blanka lum' elektra.  
En ĝi ne gajas koloraro spektra,  
ĝi - tipa, abomena amasano.*

*Forpuŝi volus mi la polvan grizon  
de l' urbo, animforton sufokanta,  
ĵetiĝi beste al l' amaso vanta;  
ĝin sange bati, mordi, tigre ŝiri! -  
Sed - ja ne eblas plu, - mi estas laca .....*

#### AL LA SORTO

*Ne donu al mi duonĝuon  
Kaj ne igu min vivi duone; -  
mia kanto jubilu plensone,  
estu vivo, ne teda enu' !*

*Mi ne volas dum viv' sendecide  
duondormi de horo al horo:  
Se ja morti, do morti, sen ploro,  
sed se vivi, do vivi sen brid' !*

Mirigi povas nur ke tiom da jaroj li tamen eltenis. Per sia verko kaj per sia fina faro li vivu plu por ni.

— W. P. R.

#### Nekrologo

Prof. D-ron Hugo Sirk nelonge post la Varsovia kongreso trafis trafik-akcidento. Ankoraŭ el la malsanulejo li skribis pri sia Varsovia ISU-prelego, kiun li intencis pretigi por aperigo en Scienca Revuo. Kvankam la sekvoj de la akcidento komence ŝajnis ne tre gravaj - Prof. Sirk skribis pri rompita kruro -, nia simpatia kaj aktiva samideano mortis pro ili.

Prof. Sirk antaŭe instruis fizikon ĉe la Viena universitato. Li estis unu el la plej aktivaj membroj de ISAE. Sur p. 4 de la unua numero de Scienca Revuo (de antaŭ 11 jaroj) aperas lia nomo kiel delegito de ISAE en Aŭstrujo, kiun funkcion li plenumis ĝis sia morto. Krome li estis membro de la komitato de ISAE.

Liaj ISU-prelegoj aperis en Scienca Revuo 6 3-14 (Munkeno, 1951), 6 91-102 (Parizo, 1950), 7 124-137 (Zagreb, 1953), 8 122-145 (Haarlem, 1954), 9 41-50 (Kopenhago, 1956), 10 73-85 (Marsejlo, 1957) kaj 11 53-70 (Majenco, 1958), kaj ampleksas entute 103 paĝojn, t.e. ĉ. 6 % de la ĝis nun aperintaj paĝoj de Sc. R. Ankaŭ en *Sciencaj Studoj* aperis artikolo lia. Li ne nur aktivis en la scienca kampo, kiel montras versaĵo lia, kiu aperis antaŭ kelkaj jaroj en *La Praktiko*, kaj ĉarma porinfana libreto kun traduko lia de la fabelo *Fingrulino* de Andersen.

Dankon al li pro la multa laboro kiun li fidele faris. Nun aliaj prenu sur sin la taskojn kiujn la morto deprenis de nia karmemora samideano Sirk.

#### Nekrologo

Mortis en la pasinta aŭtuno nia membro Chr. F. W. Slijper en Utrecht, Nederlando. En Sc. R. 10 2-35 aperis de li prilaborita „Terminaro pri la ekstera morfologio de la florhavaj plantoj”. Jam dum jaroj S-ano Slijper, pensiita inspektoro de la instruado en Indonezio, suferis de kormalsano. Li ripozu en paco.

408.92 : 62(05) = 50

408.92 : 945.31(05) = 50

### POR ESPERANTO EN LA PRAKTIKA VIVO

Dank' al klopodoj de s-ano Pierluigi Marelli, sekretario de Itala Scienca Klubo Esperantista (ISKE), du italaj fakrevuoj: „Rivista di Meccanica” (Revuo pri Mekaniko) kaj „Ingegneria Meccanica” (Meka-

nika Inĝenierarto) publikigis, okaze de la 6-a Eŭropa Ekspozicio de Ilmaŝinoj, en Parizo, dum septembro 1959, unu specialan kajeron, kiu enhavas ankaŭ la tradukon en Esperanto de la resumoj de ĉiuj artikoloj aperintaj dum la unuaj ses monatoj de la nuna jaro.

Aldonita al tiu ĉi kajero estas poŝtkarto, skribita ankaŭ en Esperanto, per kiu la leganto povas peti de la redakcio informojn kaj sciigojn pri la italaj mekanikaj firmoj. Inter la korespondaj lingvoj estas menciata ankaŭ Esperanto.

Oni povas esperi pluan agadon favore al Esperanto, fare de la redakcio de tiuj ĉi fakrevuoj, se la esperantistoj sendos multajn gratulleterojn, montrante tiamaniere la disvastigitecon de la esperantistaro. Fakuloj povas peti ekzemplerojn de la diritaj revuoj, skribante sur leterpapero de iu industria aŭ komerca firma; tio faciligos la alsendon de provekzemplero. La adreso estas: „Rivista di Meccanica”, via Fantoni 14, Milano, Italio.

Alia itala revuo: „Rivista Euganea” (Piazza del Santo 14, Padova) publikigis en sia septembra numero la komencon de artikolo en Esperanto (de G. Saggiori) pri Euganea Montetaro kaj la varmaj akvoj de Abano. (Laŭ *Heroldo de Esperanto* N-ro 1295)

5(05)SR

001(05) = 089.2(100)  
341.485(65)

## DEKLARACIO PRI SCIENCA REVUO

*Scienca Revuo* aplikas la nocion scienco en ĝia plej ampleksa senco; ĝi subkomprenas la natursciencojn kaj same la sociajn sciencojn. *Scienca Revuo* ankaŭ ne limigas sin al la fundamentaj sciencoj, ekskludante la aplikajn sciencojn. En tiu ĉi starpunkto respeguliĝas la konvinko ke fakte ĉio povas esti objekto de scienca laborado, kiam iu scienca demando formuliĝas. El tio sekvas ke ni vidas la spiritan sinte non kaj aktivadon pli karakteriza, ol la objekton. El tio sekvas ankaŭ, ke la metodoj, ĉu pensaj, ĉu instrumentaj, decidus ĉu ni science laboras aŭ ne.

Do, laŭ tiu ĉi deklaracio la sciencoj kiuj sin okupas pri juro, la homa socio, kaj la homa psiko, apartenas same al la programo de *Scienca Revuo*, kiel la sciencoj kiuj studas naturajn fenomenojn kaj naturajn objektojn. La sciencoj kiuj produktis la amasmortigilojn same estas inkluditaj, kiel la sciencoj kiuj necesas por paca kunvivado. Bedaŭrinde la militaj sciencoj estas ĉie rekonitaj kaj larĝe aplikataj, sed la scienco de la paco ankoraŭ atendas sian oficialan starigon kaj rekonon. Ni, Esperantistoj, povus instigi al la disvolvo de memstara pacoscienco.

Religio kaj politiko mem ne apartenas al la scienco, se diamo kaj potenco estas iliaj celoj kaj ne la vero en mensa koncerno. Tamen la

scienco povas sin okupi pri ambaŭ kiel objektoj, objekte serĉante la veron, eĉ malgraŭ la persona prefero de la sciencisto al ia dogmo kaj socia sistemo.

Nu, la deklaracio pri la homaj rajtoj estas atingo de la jurscienco, valora bazo por nia progreso al la paco. Tial nia redaktoro meritas plenan laŭdon kiam li montris ĝian gravecon kaj menciis la realon, kiu ankoraŭ dolorige kontrastas kun ĝia intenco (vidu Sc. R. 10 42-43 (1959)). Mi persone tre bedaŭras ke tiu ĉi artikolo, fontinta el pura homamo, incitis kelkajn francajn legantojn, ĝuste pro la uzo de unu termino: la vorto *genocido*. La nocio apartenas al la internacia kriminala juro. Kiu relegas la artikolon pri *Genocido* de prof. d-ro I. L a p e n n a (*Elektitaj prelegoj I.S.U.*, Purmerend, 1955, pp. 21-28 kaj Sc. R. 7 82-89 (1955)) ekscias ke ekzistas diversaj formoj de genocido kaj ke ne ĉiu kazo de mortigado de multaj homoj simple povas esti nomata genocido. La decido ĉu iu fiago estas aŭ ne estas genocido, apartenas al la sciencistoj de la internacia kriminala juro. Pro tio mi opinias ke ne nia redaktoro, nek la ofenditaj letterskribintoj estas kapablaj science decidi ĉu ili rajtas apliki aŭ kontesti la terminon *genocido*. Do, se la koncernaj fiaĵoj evidentiĝus „nur” homicido, nia redaktoro devus senkulpigi sin, kaj mi estas certa ke li efektive farus tion<sup>1)</sup>.

Sed ĉu tiu ĉi decido pri la rajta uzo de la vorto estas grava? De la starpunkto de la ofenditoj jes, ĉar akuzo pro genocido estas multe pli peza ol akuzo pro homicido. Sed de la flanko de la viktimoj tute ne. La abomenaĵoj restas same teruraj, kun aŭ sen decido pri la difino. Ili eĉ plu okazos kun aŭ sen nia diskutado pri la termino, sub premo de la cirkonstancoj kaj pro manko de respekto kaj kunsento al aliaj homoj. Tio signifas ke polemiko, eĉ de specialistoj pri la internacia kriminala juro, neniel povas malhelpi novajn krimojn nun. Ĉu polemiko de nespecialistoj en la internacia kriminala juro havas valoron, havas sciencon valoron kiu pravigas presigon en nia revuo? Laŭ mia opinio ne.

Cetere, ĉiu el la polemikantoj tute samopinionas en tio, ke efektive okazis kaj okazas hontindaj, malhumanaj traktadoj, ĉe ĉiuj partioj.

Ĉar pro tiuj argumentoj daŭrigo de la disputado perdas ĉiun sciencon sencon, mi, kiel reprezentanto por I.S.A.E., rekomendas ĉesigi la polemikon inter ĉiuj nefakuloj, malgraŭ la fakto ke ankoraŭ kuŝas leteroj ne jam presitaj.

G. F. Makkink,  
reprezentanto por I.S.A.E.

<sup>1)</sup> Mi uzis la vorton *genocido*, ĉar nederlanda advokato tiel kvalifikadas ĉi tion en multaj artikoloj. Tamen mi volonte lasas al fakuloj disputi pri la ĝusta termino. Por mi la faktoj gravas pli ol la nomo, kvankam supozeble ekzistas rilato inter ambaŭ. Mi strebas al ĝusta lingvuzo, kaj petas pardonon se mi ne ĉiam sukcesas.